

- Cutler A, Mehler J, Norris D & Segui J (1983) *A language-specific comprehension strategy*. *Nature*, 304, 159-160
- Cutler A, Mehler J, Norris D & Segui J (1986) *The syllable's differing role in the segmentation of French and English*. *Journal of Memory and Language*, 25, 385-400
- Cutler A, Mehler J, Norris D & Segui J (1989) *Limits on bilingualism*. *Nature*, 340, 229-230
- Mehler J, Dommergues J & Frauenfelder U (1981) *The syllable's role in speech segmentation*. *Journal of Verbal Learning and Verbal Behavior*, 20, 298-305
- Nagata H (2001) *Diferencoj inter lingvoj konsideritaj el la vidpunkto de perceptado de parolsonoj*. *La Harmonio*, n-ro 187, 4-9
- Nagata H (2004) *Esperantaj parolsonoj perceptitaj de japanlingvanoj*. *Scienca Revuo*, 55, 13-24
- Otake T, Hatano G, Cutler A & Mehler J (1993) *Mora or syllable? Speech segmentation in Japanese*. *Journal of Memory and Language*, 32, 258-278
- Privat E (1957) *Esprimo de sentoj en Esperanto*. 3-a eldono. Den Haag: Internacia Esperanto-Instituto.
- Ramus F, Nespor K & Mehler J (1999) *Correlations of linguistic rhythm in the speech signal*. *Cognition*, 73, 265-292

Notoj

- (1) Rilate al la tri perceptado-manieroj de parolsonoj, vd., ekzemple, *Cutler, Mehler, Norris & Segui* (1983, 1986, 1989), *Mehler, Dommergues & Frauenfelder* (1981), *Otake, Hatano, Cutler & Mehler* (1993).
- (2) Koncerne similecon de parolsonoj inter Esperanto kaj la itala, *Renato Corsetti* (persona komunikaĵo, la 22-an de julio, 2002) indikis, ke "efektive ĝi (Esperanto) sonas kiel la itala se oni forprenas de la itala la longecon de la vokaloj."
- (3) Tio ĉi estas pro tio, ke juĝado pri simileco estas psiĥolingvistike pli senĝena kaj tial pli facila ol juĝado pri nesimileco kiu entenas en si negativan morfemon ne (vd. *Clark & Card*, 1969; *Clark, Carpenter & Just*, 1973; *Clark & Clark*, 1977, pri tiu ĉi problemo). Analizo de grupigo, tamen, estos plunumita sur la matricon de nesimileco.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA
 Department of Clinical Psychology
 Kawasaki University of Medical Welfare
 288 Matsushima, Kurashiki 701-0193
 JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Moskvanoj kaj francoj (laŭ la verkaro de I. S. Ŝmelev)

Nikolajevna Afinskaja ZOJA

En la rusa literaturo ne estas alia verkisto, kiu same bone priskribus la ĉiutagan vivon de Moskvo de la fino de la 19-a / komenco de la 20-a jarcento, kiel I. S. Ŝmelev (Ŝmelevo). En liaj prozaj verkoj aperas la tuta universo de moskvanoj – komercistoj, etburĝoj, laboristoj de ĉiuj specialaĵoj, kaj same preĝemuloj, almonzpetuloj – sen ili ja ne eblas! – homoj el diversaj sociaj tavoloj, kunigitaj en la sama loko de Rusio, nomataj moskvanoj.

Povas ŝajni strange, ke la parolado de tiuj homoj, moskvanoj, herojoj de verkoj de Ŝmelevo, enhavas ne nur rusajn vortojn: en ĝi ofte sonas nerusaj, plejparte francdevenaj vortoj. Tio starigas multajn demandojn. Kiuj estas la specifecoj de la uzo de tiuj vortoj en lia verkaro? Kial "franca akĉento" de ŝmelevaj moskvanoj ne ŝajnas fremda, sed inverse – donas al liaj verkoj "la liberon kaj forton", pri kiuj parolis samtempuloj de Ŝmelevo? La verkisto Ivan Ŝmelev bone konis la francan kulturon. Liaj plej ŝatataj verkistoj estis francoj: *Jules Verne*, *Mariette* kaj *Emar* – ili malfermis antaŭ la juna Ivano "belegan mondon de neatingebla". Ŝajnas ke por li la plej bonaj trajtoj de francaj herojoj kuniĝis kun liaj ideoj pri la rusaj homoj kaj rusa vivo.

Kiamaniere la knabo imagis al si la francojn? La unua franco, kiun li ekvidis, estis akrobato, kiu devis flugi per flugbalono dum Paskaj festoj en publika ĝardeno (Ŝmelevo parolas pri tio en sia rakonto "Kiel ni flugis"). Antaŭ la flugo la franco drinkis verŝeton "por kuraĝo", kiel diras rusoj, ekridis, kunfrapis la manojn... Lia flugo finiĝis malbone: la balono alkroĉiĝis sur branĉo de arbo, kaj li alteriĝis nesukcese. Kiam la mastro de la cirko venigis lin por saluti la publikon, li estis pala kaj apenaŭ povis stari. En la homamaso iu diris: "Jes, la malriĉeco devigas fari ion ajn. Estas eĉ homoj, kiuj englutas sabrojn". En tiu momento la knabo komprenis, ke brilanta vestaĵo kaj heroeca konduto estis nur malriĉeco. Sed la kuraĝaj flugoj de la franco impre-

sis la knabon, li volus imiti lin, provi siajn proprajn fortojn. Franca kuraĝo kontrastis en liaj okuloj kun la griza ĉiutageco, kaj li pensis: "Ie vivas kuraĝaj kaj liberaj francoj, bele vestitaj infanoj promenas laŭ la sonoj de muziko... Kaj ĉi tie estas nur malnova korto, disfalintaj barakoj, minacoj, krioj...". Jen - tiaj estis la unuaj impresoj de francoj en la kapo de la Moskva knabo, kiam la juna homo vidis la mondon per la okuloj de siaj ŝatataj literaturaj herooj. La juna Ŝmelevo imagis, ke la francoj estas belaj, altstaturaj, kuraĝaj, samtempe galantaj kaj sentimaj, eble ne riĉaj, sed portantaj spiriton de libero.

La dua provo kaj la dua konatiĝo kun la francoj okazis en lernejo, kie la juna Ŝmelevo ne nur studis la francan lingvon, sed ankaŭ estis edukata sub severa kontrolo de sia instruistino de fremda lingvo *Anna Dmitrijevna Vertes*. Komence la knabo timis la severan sinjorinon kaj ŝiajn ordonojn en nekonata lingvo (*etase!* – france: *c'est assez!* sufiĉas!), pro kio ŝi ŝajnis al li terura vampirino! Sed poiomete li komencis senti, ke ŝi sincere interesiĝas pri liaj rakontoj. Ŝi iĝis atentema aŭskultantino kaj bonkora, favora edukistino, kaj krome ŝia franca lingvo iĝis pli komprenebla kaj ne plu timigis la knabon.

En la rakontoj de Ŝmelevo ni trovas ne nur infanan entuziasmon rilate al la francoj, kiuj personigas kuraĝon, bonajn manierojn, elegantecon. La verkisto rakontas historion, en kiu sufiĉe krude aperas la opinio de rusaj homoj pri la francoj. Dum unu el siaj vojaĝoj al la insulo *Valaamo*, centro de la rusa ortodoksismo ("Malnova *Valaam*", 1935), Ivano Ŝmelevo, "klerigita studento" de la Moskva universitato, poiomete komprenas la signifon de religio: precizaj konoj, kiuj neas la religion, ne permesas kompreni la esencon de la surtera regno. La monaĥoj de *Valaam* ne scias, certe, la teoriojn de Darvino, de *Seĉenov* (kaj poste sekvas longa listo de konataj francaj filozofoj kaj psikologoj de la 19-a jarcento – *Ribot*, *Auguste Comte*, *Prud'hon*, *Fourier*, *Bebel*) – sed ili "solvas gravegajn sociajn problemojn kaj eĉ influas la naturon". Kaj jen, unu el la maljunaj monaĥoj komencis pridemandi lin pri Rusio. Li demandis, ĉu la onidiroj pri ebla milito kun Germanio estas veraj. Poste li aldonis:

– *Iu kredanto diris al mi, ke Rusio amikiĝis kun Francio... Ĉu vere?*

– *Jes.*

– *Ho... tio estas malbona. Francoj estas ruzuloj. Ne devas Rusio fidi al ili.*

Por rakonti tiun epizodon, la verkisto devis havi certan kuraĝon, des pli ke li montras "la animon" de homoj karaj al li – monaĥoj de *Valaam*. Evidente, ne necesas vidi en la paroloj de monaĥo la vidpunkton de la aŭtoro. Sed lia honesteco rilate al sia persono, same kiel al siaj legantoj, faras el li majstron de paroloj kaj bildoj. Jen en kia larĝa diapazono oni pritaksas la francojn: de infana adoro ĝis streĉatento kaj, finfine, ĝis plena rifuzo. La lasta vidpunkto gravas, ĉar la opinio estas esprimita de homo saĝa kaj sagaca, kiun la juna Ŝmelevo estimas. Sed al ni ŝajnas nesufiĉe fari konkludojn, bazante sin nur sur la paroloj de la aŭtoro kaj homoj respektataj de li. En la verkaro de Ŝmelevo aperas tuta tavolo de opinioj, vidpunktoj, "voĉoj", kiuj donas pli larĝan kaj, sekve, pli objektivan ideon pri la rusa universo. La tutan francan leksikon, kiu aperas en la verkoj de Ŝmelevo, ni povas disdividi en kelkaj grupoj.

– Unue, temas pri francdevenaj vortoj, kiuj eniris la rusan vortaron, kies ekzemplojn ni trovas en la paroloj de Ŝmelevo mem aŭ de tiel nomata Rakontanto, tiu "mi", kiu rakontas historiojn. Tiuj vortoj estas nemultaj.

– Due, tio estas vortoj aŭ replikoj en la franca lingvo, kiuj karakterizas la nivelon de eduko kaj kulturo de iuj personoj.

– Trie, francaj vortoj, kiuj iĝis materialo por moskvaj vortfarantoj, kaj kiuj estas regule deformitaj en la parolado.

La verkisto parolanta per sia propra voĉo, aŭ el sia propra nomo, praktike ne uzis fremdajn vortojn. En "Aŭtobiografio" (1913) Ŝmelevo uzis nur unu francdevenan vorton – *манкировка* – por diri, ke li ne venis al lecionoj. En la komenco de la 20-a jarcento la rusa literatura lingvo uzis tiun vortradikon, sed por la nuntempa leganto tio sonas iom arĥaika: "Oni minacis forpeli min el la gimnazio pro mankirovkoj" (de la franca vorto *manquer*). (p. 39).

Dum la vojaĝo per ŝipo kun sia amata hundo *Mars* ("Mia Mars", 1910), la rakontanto, kiun ni ne devas tamen identigi plene kun la aŭtoro, parolas per sia propra voĉo de juna instruita homo. Li uzas la francan lingvon, manifestante tiamaniere sian socian statuson. Priskribante siajn fiaventurojn, ligitajn kun la obstina karaktero de sia kara hundo, la vojaĝanto diras: "mi montras per mansignoj la sekvojn de ĝia malbona konduto..., mi diras kaj ruse, kaj france... – Kuŝu, diablo prenu! *Куху!*" (p. 95). (*куш* [*kuŝ*] devenas de la franca vorto *coucher* – kuŝi).

La ordonoj donitaj de la mastro al lia hundo, estas plenaj francaj frazoj, sed ili estas skribitaj per rusaj literoj. Ĉi tie kaŝiĝas, laŭ nia opinio, unu el la sekretoj de la « ruseco » de la lingvo de Ŝmelevo: francaj paroloj ne eliras el la kadro de la verko. La fakto, ke la aŭtoro transdonas francajn vortojn pere de rusaj literoj, sen distingi ilin per iu ajn ortografiaj metodoj, montras, ke ili estas kompreneblaj al la rusaj legantoj. Estante vere francaj, ili ne bezonas, tamen, tradukon, sed sentebblas kiel fremdaj. Ilia uzo en la rusa parolado kune kun insultoj kreas komikan efekton kaj samtempe "hejmigas" fremdajn vortojn, transformas ilin en "preskaŭ"-rusajn vortojn.

Rakontante pri siaj studoj en la lernejo, Ivano Sergejeviĉo memorigas, ke la lernantoj timis la instruistaron de la franca lingvo, ĉar ŝi parolis fremdan lingvon. Eĉ kiam ŝi prononcis ŝajne konatajn vortojn, ili foje havis tute alian, tute nekompreneblan signifon: "Kelkfoje ŝi kriis ŝajne kompreneblan vorton – "SORTIR", sed tio estis io alia, ne tio, kion oni nomas tiel ĉe ni". (p. 385). ("sortir" franclingve – eliri, ruslingve – necesejo).

Kelkfoje li opiniis, ke la instruistino speciale difektas rusajn vortojn. Ekzemple, ŝi direktiĝis al la knabinoj: "Medmoiselles!" Kion signifis tiu kunmetado de du vortoj "med" kaj "moiselles"? Kial la instruistino ne diris konatan "mademoiselle"? Kion signifas la unua silabo en tiu vorto – "med"? ("Medmoiselles!" en la franca tio estas pluralo de "mademoiselle"; en la rusa lingvo "med" estas kutima mallongigo de la vorto "medicina"). La franca lingvo ŝajnis al la infano ne nur fremda, sed preskaŭ malamika. La lernantoj verkis plurajn ridindajn kantetojn por pli facile memorfiksi francajn vortojn, kiuj miksiĝas kun rusaj vortoj. Tiuj kantetoj iĝis vera lerneja folkloro, konata en rusaj bazlernejoj kaj gimnazioj. Oni povis kanti ilin, danci, salti. Per sia ritmo ili memorigas rusajn popolajn kantojn:

"Рэгардэ-машер-сестрица,

Кельжоли-идет-гарсон,

Сэтасэ-богу-молиться,

Нам-пора-альямезон!"

(regardez ma chère – fr.: rigardu mia kara;

Sestrica – rus.: fratinetto;

Quel joli – fr.: kia bela;

Idet – rus.: iras;

Garçon – fr.: knabo;

C'est assez – fr.: sufiĉas;

Bogu molitsja – rus.: preĝi al Dio;

Nam pora – rus.: estas tempo por ni;

A la maison – fr.: hejmen).

Ĉi tie la francaj vortoj, notitaj de infanoj, do kun personeca percepto de ĉiu vorto, estas miksitaj kun rusaj vortoj, kaj la tuta situacio iĝas komprenebla. Ŝmelevo montras per rusaj literoj ne apartajn vortojn, sed ofte sintagmojn: алямезон (*à la maison*, hejmen), кескевуфет (*qu'est-ce que vous faites* – kion vi faras, *донмуа (donne-moi* – donu al mi). Tiamaniere francaj vortoj transformiĝas en ion similan al rusaj vortoj. La verkisto kvazaŭ "hejmigas" fremdajn vortojn.

Nun mi volus atentigi pri francaj vortoj, kiuj estas ĉiam misformitaj en la paroloj de nekleraj homoj, sed tamen kompreneblaj por rusa leganto. Ekzemple, ekzistinta soldato Sidoro ("Hela paĝo", 1910) rakontante al la knabo, kiel li fratiĝis kun francoj en la fronto, diras: "Mi diras al li: jen estas pipo, jen tabako – kaj li komprenas, jesas per la kapo". En ilia lingvo tio estas "foma" (de la franca vorto "fumer"). La estinta batalanto memoras kelkajn francajn vortojn, kiujn li prononcas laŭ sia propra maniero. Por li francaj vortoj estas eblo kontakti kun alia popolo, kaj same scioj pri tiu popolo, kaj li fieras pri siaj scioj: "Ni multe parolis. Soldat' en ilia lingvo estas same soldat'. Botelo, oficiro, ĉio estas la sama. Nur ili ne povas klare paroli. La vorto *vodka* strange sonis: *udivi!* Li diras "udivi", kaj vi volas lin "udivi" kaj trinkas rekte el botelo! "Udivi" en la rusa lingvo – "surprizu min"! La vorto "udivi" estas malkorekta franca *eau-de-vie*. Same "soldat" devenas de *soldat*, "butylka" de *bouteille*, "oficer" de *officier*.

En la rakonto "Homo el restoracio" la kelnero *Ĉerepahin* uzas multajn rusigitajn francajn vortojn, kiuj apartenas al lia profesia ĵargono. Li ŝatas prononci la nomojn de francaj pladoj por impresi klienton: "Vi diras al li: *krem* de la *renj*... Li opinias, ke temas pri deserto, sed temas pri la supo." Francaj vortoj estas fleksiataj laŭ rusaj deklinaĵoj konforme al la rusa gramatiko. Moskva infanvartistino rakontas pri la vivo de rusaj virinoj en Parizo: "Sinjorinoj frotas siajn vangojn, botu faras". La vorto "bota" kun akcento sur la lasta silabo, kiel postulata la franca lingvo, uzita en akuzativo, estas rusigita franca vorto "beauté" (beleco). Nur unufoje ni vidas nemisformitan francan frazon, skribitan en la franca lingvo: temas pri mencio en la geneologia libro de nobelino *Ljapunova*, la paroloj de reĝo, kiu diris: "Maintenant c'est l'hiver, mais vos yeux, ma petite, réveillent dans mon cœur le

printemps!" ("Nun estas vintro, sed viaj okuloj, mia etulino, vekas la printempon en mia koro!")

Karakterizante la manieron de Ŝmelevo transdoni en siaj tekstoj francajn vortojn, ni notu sekvajn trajtojn. Unue – li skribas francajn vortojn nur pere de rusaj literoj, ne uzante la latinan alfabeton. Due – li fiksas prefere ne apartajn vortojn, sed sintagmojn kun unusola akĉento sur la lasta silabo. La verkisto strebas pere de la rusa ortografio transdoni la regulojn de dispartigo je silaboj en la franca lingvo. Evidente, li konis la francan lingvon sufiĉe bone por noti francajn vortojn per la franca skribmaniero. Por li tio estas stila efekto, ebleco montri, ke multaj francaj vortoj eniris la rusan lingvon, iĝis ĝiaj eroj. Oni prononcas ilin laŭ rusa maniero, sen franca fuŝprononco, ili estas kompreneblaj kaj samtempe donas al la paroloj ioman guston de fremdeco.

La lingvo de prozaĵoj de Ŝmelevo estas diverskolora. Ĝi respegulas la malsaman mondpercepton de liaj personoj. Diversaj personoj uzas francajn vortojn diversmaniere kaj por malsamaj celoj. Por iuj homoj francaj vortoj estas maniero montri sin kaj sian socian pozicion. En aliaj okazoj oni uzas francajn vortojn kiam rusaj vortoj ne ekzistas. Lernantoj kreas gajajn versetojn kun francaj vortoj kiel ekzercoj, helpantaj bone memorfiksi ilin. La needukita popolo misformas ĉiujn vortojn, aparte fremddevenajn. Ni povas konkludi, ke la difino de la rusa originaleco ne forpelas la nocion de ekstera influo. Fremdaj vortoj en la prozo de Ŝmelevo enskribiĝas nature en la paroladon de moskvanoj – kaj la rakonto ne perdas sian verecon. La kolora kaj originala prozo de Ŝmelevo permesas ekaŭdi ĉiujn nuancojn de la moskva parolmaniero.

Noto

1) Ĉi tie kaj poste citaĵoj laŭ la libro de *I.S. Shmelev* "Verkoj en du volumoj", vol.1, Moskvo, 1989.

Adreso de la aŭtorino

D-rino Afinskaja ZOJA
Prospekt Mira 120, KV 62
129226 Moskvo / RUSIO

Priaŭtora informo

La aŭtorino estas doktoro pri filozofio kaj docento ĉe Moskva Ŝtata Universitato. Ŝi instruas la francajn lingvon kaj civilizacion.

Loĝistika regado de kreditoj

Stasys GIRDZIJAUSKAS, Gintautas GARŠVA
& Egidijus MERKEVIČIUS

Vilnius Universitato, Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHF)

Enkonduko

La kvanto de la plej multaj por ni bezonataj provizoj estas limigita. Tamen kelkaj provizoj kapablas rapide renoviĝi, aŭ ili estas tiom multaj, ke pro ebla elĉerpiĝo ne indas zorgi. Malgraŭ tio, kelkaj provizoj ĉiam mankas. Al la vivaj estaĵoj ne malofte mankas spaco, nutraro, akvo, oksigeno, lumo kaj multaj aliaj aferoj. Ekonomian agadon de homoj ofte limigas financaj, homaj, krudmaterialaj kaj aliaj provizoj. Por regado de tiutipaj provizoj kutime oni aplikas loĝistikajn metodojn.

Ni esploras provizojn, kapablajn nature renoviĝi. Tiujn ĉi provizojn oni ofte nomas produkto aŭ "populacio". En tiu ĉi artikolo oni atentigas specifajn populaciojn — kapitalon. La kapitalo, same kiel aliaj nature kreskantaj populacioj laŭ la sama principo mem donas pligrandiĝantan alkreskon.

Celo de la artikolo — esplori la ĉefajn principojn de la teorio de loĝistika regado de kreditoj: esplori la influon de saturigo al interezo, esplori la loĝistikan kovron de kreditoj.

Objekto de la esploro — la fluo de kapitalo aŭ mono.

Metodo de la esploro — analitika. Ĉi tie oni aplikas metodojn de kompara kaj matematika analizo, ankaŭ ekonometriajn kalkulojn, apogitajn sur la eblecoj de informaciaj teĥnologioj.

Loĝistika valoro

Ankoraŭ en la XIX-a jarcento, esplorante la ŝanĝigon de biologiaj sistemoj, *P. F. Verhūlst* proponis la diferencigan ekvacion de populacia kresko kompletigi per multiplikanto, havanta la figuron de rekte malgrandiĝanta funkcio: $(1 - K/K_m)$, kie K = grandeco de populacio, K_m = maksimuma (lima) populacio (*C. H. Edvards & D. E. Penney* 1985).